# La NASKa Fasko

*Taggazeto de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UCSD*

**merkredon, la 7-an de julio, 2010 • numero sep**



## Venontaj eventoj

### ☞ Hodiaŭ ☜

★ **7:30 ptm:** Duncan CHARTERS prezentos en la komuna salono.

Nova!

### Ĵaŭdo

★ **2:00 ptm:** Brandon prezentos pri Brazilo, Esperanto kaj spiritismo en la komuna salono.

★ **7:30 ptm:** tabulludoj en la komuna salono.

### Vendredo

★ **2:00 ptm:** Paŭleto instruos dancadon! Renkontiĝu en lia salono, Asante #223.

★ **7:30 ptm:** filmovespero: *Conlang* kaj *Flugigi polpon ("Flying an Octopus")*

### Sabato

★ **9:00 atm:** Programo de ESF. Kunvenu en AP&M #4301.

★ **ptm:** Festo ĉe d-ro David JORDAN

***La NASKa Fasko***

**Redaktejo:** *Asante* n-ro 116
<nask.esperanto@gmail.com>


*La NASKa Fasko* aperas lunde – vendrede dum la kursaro. Kutime ĝi aperas tagmeze. Se vi ne ricevas ĝin post la matenaj klasoj aŭ en la manĝejo, prenu ekzempleron el la skatolo kiu troviĝas sur la fenestro de la redaktejo.

Ni avide atendas viajn artikolojn, fotojn, desegnaĵojn, bildstriojn, poemojn, viajn am-leterojn… preskaŭ ion ajn! Memoru, la *Fasko* estas taggazeto ***por vi kaj pri vi***: viaj kontribuaĵoj igas ĝin interesa. Do nepre kontribuu!

Se vi ne sentas vin tute kompetenta pri verkado, ne timu; ni volonte helpos vin korekti kaj poluri. Serĉu unu el niaj lingvo-helpantoj; sur siaj nomŝildoj ili portas specialajn glumarkojn kun rideto (☺) – kaj ili ridetante helpos vin korekti, poluri, kaj plibonigi vian verkon. Kiam la verko pretas, sendu ĝin per retpoŝto al la adreso supre, aŭ simple portu ĝin piede al la redaktejo.

# Ĉu vere D-ro William S. BENSON?

*De Kristy LOMMEN*




Krom gramatikajn aferojn en Esperanto, ni studis ankaŭ du famajn esperantistojn en la Esperanto-Klubo de mia 12-jaraĝa filo. Nepre Zamenhof estis la unua; kaj ni sekve studis ankaŭ Doktoron William Sol BENSON, verkiston de la antikva kaj grandioza *Universala Esperanto Metodo* (eldonita en 1932). Ni havis du kialojn por tio. Unue, ĉar lia libro instruas Esperanton per bildoj, ni ofte uzis paĝojn el la libro; la bildoj tre plaĉas kaj helpas la infanojn kiam ili lernas la novan lingvon. Due, en mia hejmurbo en Vaŝingtonio, ni havas multe da familioj kiu migris el Ukrainujo al Usono. Ankaŭ D-ro Benson migris same dum la pasinta jarcento. En 1877 li naskiĝis en Kievo (tiam en Rusujo), kaj li estis ankoraŭ knabo kiam li eklernis Esperanton in 1889. Baldaŭ li kaj lia familio migris al Usono. La nuntempaj lernantoj en nia lernejo ne ofte aŭdis pri iu ukrain-usonano, kaj D-ro Benson estis ne nur ukrain-usonano, sed ukrain-usona esperantisto – mirinda afero, ni opinias, aparte por niaj novaj ukrain-usonaj esperantistoj en la klubo!

Antaŭ du monatoj, mi aĉetis la suban foton per la Interreto. Sur la dorsa flanko estas skribita "Esperantistoj, 1928" sed la vortoj, laŭ informo de la vendisto, estas en la bulgara lingvo. La nomoj de la esperantistoj ne estas listigitaj. Malgraŭ tio, mi aĉetis ĝin. Okulvitroj mankas al la viro en la foto, sed, krom tio, li aspektas preskaŭ same kiel D-ro Benson, mi opinias. Kion vi pensas? Ĉu la foto eble montras D-ron Benson?

*Noto de la redaktisto: se vi interesiĝas pri la mirinda libro de D-ro Benson, ĝi nun haveblas rete, danke al la Edmontona Esperanto-Societo. Vidu la retejon:* http://esperanto-edmonton.wikidot.com


La Uzado De La Sufikso "EG".

| | | | |
|---|---|---|---|
| GLASO. | GLASEGO. | UNGO. | UNGEGO. |
| TAMBURO. | TAMBUREGO. | NAJLO. | NAJLEGO. |
| KULERO. | KULEREGO. | PORDO. | PORDEGO. |
| FORNO. | FORNEGO. | PAFILO. | PAFILEGO. |



**Fotoj:** *(plej supre)* desegnaĵo de Benson el lia *Universala Esperanto-Metodo*. (Maldekstre) parto de paĝo el la sama libro. Dekstre: la foto de la anonima esperantisto – ĉu eble Benson?

# La internacia aŭto

*de Aparecida* ARAUJO

Bonŝance en ĉi tiu jaro, la periodo de NASK koincidis kun la 4-a de julio, kiu gravas en Usono, ĉar antaŭ 234 jaroj, en 1776, estis akceptita la Deklaro de Sendependeco, kiu proklamis egalrajtecon de usonaj homoj. Tiu tago estas celebrata kiel "tago de sendependeco". (Boris KOLKER, *Vojaĝo en Esperantolando*).

Por kuncelebri, NASKanoj estis invititaj spekti piroteknikaĵojn en La Jolla, dimanĉon post la sunsubiro, je la 9-a horo.

Dek unu NASKanoj akceptis la inviton. Du inter ili havas aŭtomobilon, kaj ĝentile savis nin de la antaŭvidita, prema aŭtobusa reveno.

Ni estis apartigitaj hazarde, ses personoj en unu aŭto kaj kvin en alia. Survoje Katalin tuj observis la internaciecon de nia aŭto. Fenomeno kiun nur Esperanto povas okazigi. Personoj el kvar kontinentoj, el ses landoj, el ses malsamaj naciaj lingvoj, (Meksiko, Argentino, Brazilo, Hungarujo, Israelo kaj Irano), pere de Esperanto gaje parolis kaj facile komprenis unu la alian.

Estis tiom signifa okazaĵo por nia grupo, kaj Katalin havis la ideon foti, kaj ankaŭ mi kaptis la okazon registri, ĝuste antaŭ la domo de D-ro David JORDAN, kiu piede kondukis nin laŭ la marbordo, en La Jolla, ĉar la aŭton oni devis lasi tie, pro amaso da homoj en la urbocentro.



Foto de Katalin KOVÁTS

En la alia aŭto estis kvar usonanoj kaj D-ro Duncan CHARTERS, kiu loĝas en Usono, sed devenas el Britujo.

La piroteknikaĵoj estis treege belaj, kaj daŭris pli-malpli 30 minutojn.


D-ro David JORDAN afable prizorgis pri poŝlampoj por ĉiuj ni, por la malluma laŭmarborda reveno. Li ankaŭ afable regalis nin per biero, pufmaizo kaj bongustaj maizflokoj, dum ni atendadis la disiĝon de la densa trafiko, tuj post la piroteknikaĵo.

Estis tre interesa programo, kaj por tiom kaj tiam, dankon al nia majstro D-ro Lazaro Ludoviko ZAMENHOF.

# Dankon!

Ni (junuloj kiuj lastatempe faris la KER-ekzamenon en San Diego) volas elkore danki tiujn anonimajn kontribuantojn kiuj per financa subteno ebligis al ni kapti la okazon ekzameniĝi pri Esperanto. La sperto estas vere havinda, kaj ni multe aprezas vian afablan, sindonan helpon. Koran dankon!

— Steven CYBULSKI, Chris WINGROVE kaj Brandon SOWERS



**"Tiu ludo ne tiom kurigas nin, kiom teniso..."**
(el *Kulturaj Kajeroj*, 1964:2)

# La morgaŭa posttagmeza programo

Dum la lasta somero, Brandon vizitis Brazilon kaj tie partoprenis en la 44-a Brazila Kongreso de Esperanto. Ĉeestis ĉirkaŭ 400 samideanoj kaj ĝi daŭris unu semajnon, atesto pri la grando kaj forto de la brazila movado.

Imponis lin la laboro por Esperanto fare de la religio Spiritismo. Multaj brazilaj samideanoj estas adeptoj de tiu religio, kaj la Brazila Spirita Federacio estas inter la plej grandaj Esperanto-eldonejoj.

Post reveni, li verkis finjaran projekton ĉe lia universitato pri la rilato inter Spiritismo kaj Esperanto kaj la signifo de ili en la historia kaj kultura kuntekstoj brazilaj. Li parolos pri sia vojaĝo kaj neformale prezentos skizon de sia projekto.

# Ne forgesu pri la libromendo!

Ni baldaŭ sendos al E-USA la komunan libromendon. Agu tuj! Se ni acetos pli ol tri librojn eldonitajn de E-USA, ni ricevos rabaton. Kaj eĉ se vi aĉetos libron ne eldonitan de E-USA, vi ŝparos iom da sendokosto. Kontaktu al Hoss por partopreni, sed ne prokrastu!

